# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 56, Numero 01, Junio 2020*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Steven Garamy

*Nicole Else, Sekretario de EFNSK*




Mi pensas, ke Steven komencis lerni Esperanton en 2013. Ĉiukaze la unuaj retmesaĝoj kiujn mi ricevis de li estis en 2013. Komence de 2015 li akceptis prelegi dum la somerkursaro en Melburno. Li ankoraŭ tute ne flue parolis, sed li tamen kuraĝis paroli antaŭ publiko. Iom poste li vojaĝis al Eŭropo kaj vizitis interalie Herzberg en Germanio, la tiel nomitan Esperanto-urbon.



En 2017 Steven partoprenis la somerkursaron en Brisbano. Krome li ja ĉeestis multajn kunvenojn en Sidnejo, partoprenis en lingvaj festivaloj. Li ĝuis, ekzemple, en la sidneja klubo la paroladon de Amri Wandel pri astrofiziko kaj raportis pri tio sur sia Facebook paĝo. Li tre interesiĝis pri lingvoj kaj kapablis paroli la hungaran kaj kelkajn aliajn lingvojn. Liaj gepatroj estis hungardevenaj.



Krom intereso por lingvoj li estis tre sportema kaj fotema. Sur Facebook oni povis ege ofte vidi foton de li kun diversaj personoj. Sur la fotoj li ĉiam havis grandegan rideton. Profesie li estis kontisto. Li estis ĉiam tre afabla, babilema kaj ŝajnis esti feliĉa persono. Tamen li eble suferis pro dupolusa perturbo. Li memmortigis sin ĉi-monate. Li aĝis proksimume 50 jarojn. Lia Facebook paĝo estas plenplena de komentoj de personoj kiuj tre ŝatis lin. Multegaj personoj nun sentas mankon pro lia foresto. Pri memmortigoj oni ĉiam demandas sin, ĉu io estis farebla por eviti tian tragedion.






## Nova maniero kunveni: virtuale

*Jonathan Cooper, kasisto de Esperanto NSW kaj vicprezidanto de AEA*

Pro la kronvirusa pandemio, kaj la reguloj pri socia apartiĝado, kutimaj kunvenoj de Esperantokluboj devis ĉesi. Anstataŭe, nova formo stariĝis: la virtuala kunveno – plej ofte per la videa grupbabila sistemo, Zoom. Dum la pli malnova sistemo Skype funkcias kvazaŭ telefona konversacio ( unu persono alvokas aliajn, kiuj jam devas esti konektitaj al la alvokanto), Zoom funkcias iel kiel tradicia kunvenejo: Iu ajn, kiu havas la ligilon kaj la pasvorton, rajtas eniri. Krome, Skype estas senkosta por konversacioj sen tempolimoj, kaj teorie sen limo pri la nombro da partoprenantoj, dum senkosta Zoomkonto ebligas kunvenojn nur ĝis 40 minutoj. La kosta konto de Zoom forigas tiun limon kaj havas aliajn eblecojn, kiuj eble utilas.

Antaŭ la pandemio, mi uzis la sistemon Skype (senvidee) por kunvenoj de la estraro de AEA, kaj la sistemon Zoom por kelkfojaj kunvenoj de la estraro de Esperanto NSW, kiam unu aŭ du estraranoj ial ne povis veturi al EsperantoDomo. Nuntempe, ĉiu estrarkunveno de Esperanto NSW okazas per Zoom por ĉiuj.

Kompreneble, reala, fizika kunveno havas avantaĝojn super virtuala: ne ekzistas "teknikaj problemoj", oni povas vidi kaj aŭdi unu la aliajn multe pli bone, oni povas pli facile paroli flanke al alia aŭ kelkaj aliaj se oni volas, kaj, tre grave, homoj povas manĝi kaj trinki (drinki?) kune! Tamen, por mi, virtuala kunveno havas du realajn bonaĵojn: Mi loĝas iom for de Sidnejo kaj EsperantoDomo. Por la veturo per publika transporto, mi bezonas pli ol du horojn ambaŭdirekte. Pro tio mi ne ofte ĉeestis la ĉiusabatvesperajn kunvenojn, "Public Esperanto Learning". Tamen, ekde la komenco de virtualaj kunvenoj, mi nun nur devas piediri al mia studejo kaj ŝalti mian komputilon. Due, kunvenoj ĉe EsperantoDomo kutime havas homojn, kiuj loĝas sufiĉe proksime al Sidnejo, kaj de tempo al tempo, esperantistojn, kiuj vizitas Sidnejon de aliaj landoj aŭ ŝtatoj. Tamen, distanco ne estas limigo por virtuala kunveno. Ekzemple, estis plezuro renkonti esperantiston de Orange (regiona urbo de NSK) en kelkaj Zoomkunvenoj, en kiuj mi partoprenis. Fakte, dum tiuj kunvenoj, ne estas malofte havi pli da partoprenantoj eksterlandaj ol aŭstraliajn. Ĉu estas iuj limigoj aŭ problemoj de virtualaj kunvenoj, krom tiuj menciitaj kiel avantaĝoj de realaj kunvenoj? Jes: Ĉar iu povas veni – kaj fakte venas – iam ajn, de ie ajn en la mondo, oni ne havas eblecon vere ekkoni novajn homojn. Mi kelkfoje konsciis, ke iuj jam konis aliajn, kiujn mi ne konis – eble dum UK aŭ eksterlanda vojaĝo. Kaj ofte, dum kunveno de du horoj, eĉ estis homoj, kiuj neniam parolis. Alia problemo estas, ke kelkfoje du homoj, aŭ pli, ekparolas samtempe, pro la neevitebla tempoprokrasto. Tiuj du limigoj estas plimalpli naturaj rezultoj de la teknologio. Tamen, alia estas pli evidenta pro la aliaj limigoj: Ĝis nun plejmulte da neestraraj kunvenoj, en kiuj mi partoprenis, okazis senstrukture. Kelkfoje oni proponas temon por diskuti, tamen tiun oni ne malofte ignoras, aŭ la diskuto/babilado forvagas. Dum unu kunveno, por festi la 80an naskiĝdatrevenon de Trevor Steele (montrita ĉi tie), ĉiu havis la okazon diri kelkajn vortojn al Trevor, do estis iom da strukturo. Tre baldaŭ okazos interesa eksperimento ĉi tia: virtuala unutaga aŭstralia "kongreso", dimanĉon, la 7an de junio 2020, 08:30–20:00 (laŭ la horzono de NSK). Ĝi havos kontribuojn de eminentaj esperantistoj de Aŭstralio kaj la mondo, inkluzive de Duncan Charters (prezidanto de UEA), Renato Corsetti, jOmO, Katalin Kováts, Keyhan Sayadpour (prezidanto de Irana Esperanto Asocio) kaj nia Trevor Steele. Ankaŭ okazos iuj lingvosesioj por komencantoj. Oni povos partopreni la tutan tagon aŭ individuajn sesiojn kaj ĝi estos tute senpaga. AEA pagas por Zoomkonto, kiu ebligos senlimajn sesiojn kaj aliajn funkciojn. (Vizitu la AEA retejon por pli da informo.5)

Tio estos interesa kaj utila eksperimento ĉar, kvankam ni esperas, ke la venonta Aŭstralia kaj Nov Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro en Sidnejo (januaron 2021)6 ankoraŭ povos okazi ĉe Sancta Sophia College, eblas, ke eksterlandanoj – kaj eble loĝantoj de iuj aŭstraliaj ŝtatoj – ne rajtos vojaĝi al NSK tiam. Tial ni preparas al okazigado de "hibrida" kongreso: kaj fizika, kaj virtuala.

Notoj:

1. https://zoom.us
2. Zoom ankaŭ ebligas, ke la organizanto devos rajtigi ĉiun eniri individue.
3. "Teorie" ĉar, laŭ mia sperto, se pli ol kelkaj partoprenas videe, la kvalito de la konekto percepteble malboniĝas.
4. Post 40 minutoj, oni devos restarigi la kunvenon kaj ĉiuj devos realiĝi.
5. http://aea.esperanto.org.au/eo/virtuala1tagakongreso2020/
6. http://aea.esperanto.org.au/eo/prini/kongreso/




Foto: Zoomkunveno por Trevor


## EFNSK estas en Instagram nun


*Doris Chen, membro de EFNSK*

Ekde la 5a de aprilo EFNSK havas sian propran Instagramon, kies nomo estas Esperanto_NSW. La celo de ĉi-konto estas diskonigi diversajn eventojn de la lokaj Esperanto-kluboj kaj enhavojn pri Esperanto-domo, ekzemple biblioteko, diversaj esperantaj libroj, kaj Esperanto-parolantoj kiuj vizitis la ED. Samtempe, konstruu konekton kaj amikecon kun aliaj Esperanto-kluboj aŭ Esperanto-parolantoj el la tuta mondo. Ĝis nun ekzistas preskaŭ 160 sekvantoj. Se vi volas scii pli pri EFNSK, bonvolu sekvi nin en Instagram! Kompreneble, ankaŭ ni havas Fejsbuko-paĝon, vi nur bezonas serĉi Esperanton NSW por trovi nian paĝon! Ĉar ni komprenas, ke ĉiuj havas malsamajn preferojn pri programoj de sociaj amaskomunikiloj, do ni establis niajn proprajn kontojn kaj paĝojn en diversaj ĉefaj sociaj amaskomunikiloj por transdoni informojn pri EFNSK al multaj esperantistoj.

[www.instagram.com/esperanto_nsw/](https://www.instagram.com/esperanto_nsw/)

[www.facebook.com/EsperantoNSW/](https://www.facebook.com/EsperantoNSW/)



## Vojaĝo en Italio

*Adam Levy, direktoro de EFNSK*




Ĉi-januaro, mi vojaĝis Italien kun mia koramikino dum du semajnoj. Ni envenis Romon la nokton de la 20a de januaro, kaj restis en apartamento apud la Vatikano.

Dum la sekva tago, ni komencis nian vojaĝon. Unue, ni vizitis la muzeon de la Vatikano. Ĝi havis multajn antikvajn statuojn kaj aliajn artaĵojn, kiel farbbildojn. Finfine, ni vidis la faman Sistinan Preĝejon, kiu estis tre bela. Post tiu, ni promenis ĉirkaŭ la urbon kaj vidis la belan Kastelon de Sankta Anĝelo, sed jam estis tro malfrue por eniri. Ni decidis ke la venontan tagon, ni enirus. La elvido el la Kastelo de l'urbo estis mirinda. Oni povas vidi la tutan Romon!



Kompreneble, ni vizitis la Koloseon kaj aliajn muzeojn, kaj post 6 noktoj, ni aŭtobusumis Bolonjen.

Bolonja estas eta urbo, kaj ne venis tien multaj vojaĝantoj. La popolo estas plejparte studentoj je la Universtato de Bolonjo, kiu estas tre konata en Italio. Pro la manko de turistoj, ni ĝuis la "veran" Italan atmosferon, kiun la urbo donis al li. En Romo, ĉie estis homoj kiuj volis vendi malmultkostajn stultaĵetojn por turistoj, sed Bolonjo ne havis tiajn homojn. Ĝi estis tre mallaŭta urbo, kaj ĉarmis al ni nun promeni en la stratoj.




El Bolonjo, ni trajniris al Florenco, kie ni renkontis amikon de Dima, Marko, kiu loĝas en Florenco. Li konis la urbon tre bone, kaj ankaŭ sciis multajn interesaĵojn pri la historio de Florenco. Li gvidis nin al malnova preĝejo de la familio "Mediĉi", kiu regis Florencon antaŭ kvin cent jaroj.

En la "Galerio de l' Akademio" ni vidis la statuon de Davido, kiun verkis Mikelanĝelo. Ĉi tiu statuo estas la plej bela artaĵo, kiun mi jam vidis. La detaloj kiju estis en la marmoro ne ŝajnas kiel dura ŝtono, sed mola argilo. Mi ankoraŭ ne povas kompreni kiel la artisto povis krei tian detalan kaj vidŝajne arton.

La fina urbo, kiun ni vizitis estis Napolo. Dum tiu parto de la vojaĝo ni estis jam tre lacaj! Ni vizitis "Subteran Napolon"; Antikva Roma akvujo, kie ili konservis akvon antaŭ 2000 jaroj. La popolo Napola restis tie, en la kavernoj dum la bombadoj de la dua mondmilito.








Finfine, ni vizitis Pompejon. La antikvaĵoj estis tre interesaj. Mi tre ĝuis la vojaĝon, kaj mi sentas tre bonŝanca ke ni povis vojaĝi antaŭ la komencado de la kronviruso.

## Zoom-intervjuo kun Trevor Steele



La 27-an de junio je la 18:30 (GMT+10) okazos zoom-intervjuo kun Trevor Steele, aŭstralia Esperantisto, instruisto kaj aŭtoro de rakontoj, noveloj kaj romanoj en Esperanto. La verkaro de Steele estas forte influita de vojaĝspertoj akiritaj i.a. en Germanio kaj en Orienta Eŭropo. Ĝi ankoraŭ riĉiĝis pro spertoj en Azio kaj en Aŭstralio, ĉefe pri la problemoj de aborigenoj, ĉe kiuj li laboris en eduka fako dum unu jaro kaj duono.
De la komenco de 2002 ĝis aprilo 2004 Steele laboris kiel Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio. Ĝis 2010 Steele estis membro de la Akademio de Esperanto.
Bv., prepari viajn demandojn kaj gajni premion: subskribita libro de Trevor Steele.
https://www.facebook.com/events/712127386284363/

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00 (ne en junio)
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Jonathan Cooper |
| Estrarano: | Alan Turvey, Adam Levy |

